

Ora Ĵurnalo

Numero 1, nov-dec 2017

Al la tuta mondo:

Bonvenon al la verda Gotenburgo !



Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org



Bonvenon al la nova *Ora Ĵurnalo*!

La ĵurnalo estas ilo de la Ora Klubo, Esperanto-Societo de Gotenburgo – sed espereble de tempo al tempo kun disvastiĝo en tuta Svedio.

Respondecas Ingegerd Granat kaj Siv Burell. Ni neniam antaŭe "eldonis ĵurnalon" kaj kompreneble ni bezonas tempon por trovi la ĝustan formon. Kunlaborantoj estas bonvenaj!

Kial ni provas elsendi ret-ĵurnalon? Ĉar ni fieras pri la nova esperantobiblioteko kaj volas dividi kun vi niajn spertojn. La 15an

ĉiun monaton ni havas programon por gotenburganoj, Lerumanoj kaj aliaj anoj.

Pri la ordinara programo de Esperanto-Societo de Gotenburgo vi povas legi en www.esperanto-gbg.org, sed okazos ke ni raportos kaj komentos ankaŭ pri "ne-Ora-klubo-agado".

Oro – jes oron ni bezonas por la luo de lokalo. Ni aĉetis higrometron / humidforigilon. Longtempe ni pruntis tian ilon, sed nun Ora Klubo havas propran kaj la libroj fartas bone!



Göteborgs Esperantobiblioteks Guldklubb "Ora Klubo"

En stödförening för vårt bibliotek i Stannum har bildats. Vi hoppas du vill vara med! Klubben har en träff varje månad den 15:e kl 17 i biblioteket i Stannum (eller annanstans) med ett överraskningsprogram och ett tema att prata omkring på esperanto. Medlemsavgift 100 kr/år, betalas till Societos plusgiro 43612-1, ange Membreco de Ora Klubo. Skicka samtidigt ett mail – gbg@esperanto.se – till oss så att vi har dina kontaktuppgifter. Skicka mail också om du vill veta mer. Välkommen!

*Mi estas "Espera Porko", ne preterpasu sen manĝigi min kiam ni trafos nin!
Mi laboras por la biblioteko en Stannum.*



Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum, Östadsvägen 68. La eldonfrekvenco estos neregula, sed proksimume ĉiun duan monaton. Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com. Fina paĝarangō: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!

La Esperantobiblioteko en Stannum

en la komunumo Lerum, 3 km de la limo de Gotenburgo kaj 30 km de la centro. La buso Blå Express bone funkcias. La haltejo Stannum estas tre proksima al la biblioteko.

Sed oni devas antaŭe telefoni, por ke Siv Burell (070-721 34 79) aŭ Ingegerd Granat (073-502 53 32) malfermu la pordon. Ankoraŭ ne estas ŝildo, kiu montras ke estas biblioteko. Adreso: Östadsvägen 68.

Do, la Esperanto-biblioteko de Gotenburgo ekde la printempo 2017 troviĝas en kelo de la eksa nutraĵvendejo – Jonssons Livs. La inaŭguro okazis la 15an de septembro.

Lill Jansson, komunuma ĉefkonsilisto en Lerum, tondis la verdan bendon kaj Christin Granat ludis festmuzikon. La planitan artfajradon ni ne uzis, ĉar pluvegis kaj iomete fulmotondris. La lokalo ne estas granda, nur 15 m², sed tamen ni havis spacon ankaŭ por eta teatraĵo. Lasse Granat rakontis pri Åke Holmberg, kiu verkis Ture Sventon, tiam aktuala kiel kurslibreto. Omar el la araba dezerto (Ingegerd Granat) venis portante sian flugigeblan tapiŝon kaj interparolis kun Ture Sventon (Siv Burell). Poste ni manĝis fastobulkojn, kiuj estis la plej ŝatata frandaĵo de Ture Sventon.



Kelkaj fotoj de la "bibliotekejo" en Stannum




Bli medlem i Ora Klubo ! pg 43612-1. Bv. skribi: *Membreco en Ora Klubo* + vian e-poŝtadreson!

El la skatoloj en Stannum

Ĉu estis pliaj kontaktoj inter Eldona Societo Esperanto kaj eksterlandaj eldonejoj en la okdekaj ol nun? Ĉu Svedio tiam havis pli da

interkontaktiga rolo? Ĉu pli da mondvojaĝantoj venis al ni tiam?



El nia fotokolekto

Se vi scias ion pri la personoj, bv. skribi al mi.
Ebbe Vilborg mi ja ofte renkontis, sed
..... Malmsten kaj Bengtsson estas


nekonatuloj por mi. De kie estas la suba
bildo? Ĉu de Frostavallen, Skanio? /Siv



Letero sub ŝranko estis mesaĝo de malnova tempo

Sub kuirŝranko en la olda kampara butiko de "Glindran" kuŝis letero de forpasinta tempo kiam la dua mondmilito furiozis en Eŭropo kaj la manĝaĵoj estis porciigitaj po unu al ĉiu persono, laŭ "Katrinelholms-Kuriren".

La letero datiĝas de la 27a Novembro, 1941.



Severa vintro regis ekde la fino de Oktobro. Nun estas iom malpli severa temperaturo. Estas denove farebla plugi la kampojn.

Per-Albin Hansson estas ĉefministro. La germana armeo bombardis Leningradon, Moskvon kaj pli multajn lokojn sur la orienta fronto. Grandaj eventoj en la mondo!

Svedio ankoraŭ ne okupita de la hororo de milito.

Tiel tekstas la letero kiu estis trovita sub la planko, laŭ la nova posedanto de la butiko kiu mem faris la lignaĵojn de la domo. La letero estas tre interesa kaj admonas ĉiujn doni mesaĝojn al la genepoj kaj al aliaj estontaj homoj.

La trezoro de Timboholm ekster Skövde

"Sjôle-Lötta" kaj "Blu-Per" vidis koboldojn kiuj dancis nokte sur monteto. Ili lumigis sin per la trezoro, la paro rakontis.



En 1904 oni trovis grandan ortrezoron. Oni povas legi en multaj historilibroj pri la trezoro en Timboholm. La trezoro pezas 7 084 kilogramojn. Neniu scias kial aŭ kiel la ortrezoro venis tien.

Kion vi pensas? Ĉu vi volas klarigi?

Skribu vian historion por la Ora Ĵurnalo!
(ingegerd.granat@telia.com)

Legu jenajn librojn:



La libroj de Birgitta Berglin temas pri rilatoj en la familio kaj estas tre amuzaj. Ili estas haveblaj en "Adlibris" kaj "Bokus" en la reto.

"Neniu lernas lingvojn kiu ne legas librojn en la gepatra lingvo!"

Mi rekomendas ankaŭ:

Ĝi estas tre streĉa libro kiun la biblioteko en Stannum vendas. /Ingegerd



Aniarao – ĉiam aktuala

Antaŭ 60 jaroj la poemaro Aniarao de Harry Martinsson eldoniĝis. Ankoraŭ la poemoj de la fina kosmovojaĝo de la homaro estas inspiro al novaj generacioj de kultur-laborantoj. Pasintjare eldoniĝis bildromano, inspirita de Aniarao, albumo kaj komputila ludo. En majo–junio ĉijare Aniarao estis prezentata sur la Opero de Malmö. Muziko Karl-Birger Blomdahl, libreto Erik Lindegren kaj koreografio Birgit Åkesson.



Kiam mi serĉis bildon pri Aniarao interrete, mi trovis ĉi tiun. Surprizo! Mi tuj rekonis mian propran T-ĉemizon. Kiel la bildo troviĝas rete? Ho,

mi scias! Ĵurnalisto de Lerums Tidning faris kelkajn fotojn, kiam ŝi intervjuis min por artikolo pri la biblioteko en Stannum. La artikolo aperis 11 oktobro en Lerums Tidning:

<http://www.lerumstidning.se/2017/10/bocker-pa-esperanto-i-nytt-bibliotek/>

Bertil Nilsson (sur bildo) kune kun William Auld tradukis esperanten. William Auld karakterizis en la libro "Kulturo kaj internacia lingvo" 1986 tradukadon kiel "La plej malfacila arto" kaj ekzemplis per Aniarao.

Jen kion li skribis: "Kiel esperantisto mi estas konvinkita, ke 'nia lingvo kapablas ĉion', kaj tio inkluzivas la ŝajne neblan. Kiam Bertil Nilsson invitis min kunlabori en tradukado de la majstra verko de Harry Martinson Aniarao, mi estis forte ekscitita. Sed mi sciis, ke en la angla traduko, kiun faris la skota poeto Hugh MacDiarmid, ne estis tradukita la 42a Kanto, kaj estis tie skribite: '42 estas ellasita, konsente kun la aŭtoro, ĉar netradukebla'. Mi do skribis al Bertil, ke mi provos traduki tiun

kanton, kaj se mi sukcesos mi tradukos la tutan verkon. Kaj, fakte mi produktis kontentigan tradukon. Mi ne scias, kompreneble, kial precize MacDiarmid rezignis pri tiu kanto. Eble pro ĝia lirika formo: kvin strofoj kvarversaj, el kiuj kvar strofoj dependas de la sama rimsono; sed pli probable pro komplika kalemburo (=vortludo) en la kvara verso. Mi supozas, ke tiu lasta estis la decida faktoro, ĉar nenie en la poemo MacDiarmid multe atentis la formon. Sed solvon de la terura kalemburo mi trovis, kiun Bertil akceptis, kaj ni kune fintradukis la tutan verkon, kaj tiu sperto restas al mi kiel unu al la plej mirindaj spertoj de mia tuta vivo".




Ni fieras havi tiel spertan tradukiston en la sveda esperantomovado! Mi intervjuis Bertil la 13an de novembro. Li havas tre multe por rakonti. Mi intencas skribi pli en venontaj numeroj de Ora Ĵurnalo. Li estas la sola membro de la Esperanta Civito en Stokholmo. Mi volonte scius pli pri tiu parto de Esperantujo. La 26an de novembro Georgio Silber venos al Svedio por konferenco. Mi petas al tiuj, kiuj aŭskultos lin, skribu artikolon por Ora Ĵurnalo! /Siv

Librosugesto

Andreas Nordström elektas unu el la libroj de nia biblioteko / librostoko – Roseanna.

Se vi ne antaŭe legis ĝin, aĉetu el nia stoko por vi mem aŭ kiel kristnaskan donacon. Ĝi kostas 50 SEK + fraktkosto. /Siv



Roseanna, krimromano de Maj Sjöwall kaj Per Wahlöö, tradukita el la sveda de Malte Markheden.

En nia librovendejo, www.esperanto-gbg.org > *bokshop*, troviĝas vere leginda romano, Roseanna, de la mondfama verkista duopo Sjöwall kaj Wahlöö.


Temas pri krimromano kie la ĉefkriminalasistanto Martin Beck devas trovi la murdinton de juna knabino, kiu estis trovita en la fundo de la kanalo Göta kanal.

Estas streĉa legaĵo kaj la esperanta traduko estas facila kaj fluanta. Mi ne legis la svedan originalon kaj do ne povas juĝi pri la fidindeco de la traduko fare de Malte Markheden, sed la esperanto de Malte estas ĝuinda. Li tamen foje tradukis tro laŭvorte, kio certe perpleksas ne-svedajn legantojn, sed por svedlingvano estas sufiĉe facile eltrovi, kion li celas per ekz. elliverita (utlämnad), alkomfortigi sin (bekväma sig), tuvo (tuva) ktp.

La libro havas kartonan kovrilon kun bela kolorfoto. La paĝoj estas de bona papero stabile gluitaj al la dorso. La teksta apero estas tre klara.

Andreas

ESPERANTO-SUMOO



ESPERANTO-SUMOO

Inspiriĝu legi esperantolibrojn per via konkursinstinkto! Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj pri legado de esperantolibroj en januaro, marto, majo, julio, septembro kaj novembro. Unu konkurso daŭras 15 tagojn. Vi elektas libron kaj decidas kiom da paĝoj vi legos tage.

Se vi legos pli ol promesitaj paĝoj dum unu tago vi akiros o-markon, se malpli, x-markon. Vi ne luktas kontraŭ aliaj luktistoj, sed kontraŭ vi mem. Librojn vi povas prunti aŭ aĉeti en nia biblioteko.

Legu pli pri Esperanto-Sumoo kaj aliĝu al la venonta konkurso en januaro per la retpaĝo: www.esperanto-sumoo.strefa.pl

El Ora klubo -kunveno, 15 nov. en la teknika ĉambro de la gimnazio de Ingrid Segerstedt. Tempo por rakonti memoraĵojn.



Ingegerd rakontis pri sperto de Upsalo: Kiam mi falis por esperanto – drameca evento!



Roger Nilsson kunprenis sian amikon, Agne Svanberg, verkisto de interesa libro: "Gemensamma värderingar för att rädda civilisationen", libere elŝutebla el la reto. En januaro ĝi estos eldonita en la angla kaj eble iam tradukota esperanten. **Ĉu iu pretas fari tion?**

Ĉar Agne ankoraŭ ne parolas esperanton ni laŭvice interpretis en la svedan. Ankaŭ bona sperto!



Francisco Prieto parolis pri la konfliktoj inter kubanoj kaj amerikanoj, sed ne inter la esperantoparolantoj. Andreas Nordström parolis pri kurskunveno en Raŭmo, Finnlando.



Inga parolis pri siaj "militgefratoj" el Finnlando. Margareta iam havis ĉinan tranoktanton, kiu montris al ŝi kiel kuiri ovojn – "2-minutajn"!

Ne perdu okazon influi la politikon!

Fredsam – kiu kunordigas kelkajn pac-celitajn organizaĵojn – informis pri la Paca Domo, Fredshuset, en Upsalo. Ni miris ke ili havis tiom grandan influon sur la politikistoj, ke ili

sukcesis ricevi lokalon en la kastelo. Ĉu la politikistoj en Gotenburgo donus al ni parton de la militista kastelo en Kviberg? Mi dubas.



Gotenburga etoso

el "Vårt Göteborg, Göteborgs Stads Nyhetstidning", sabate 18 novembro 2017.



Sedan 1998 står Eino Hanskis staty av Sten-Åke Cederhök på Storgatan på Liseberg. Foto: Carin Smederöd

Bildo pri Albert kaj Herbert de prezentado en la Liseberg-teatro en septembro 1983.

La knabeto de Carlsson de Gislaved pli poste transformiĝis en Sten-Åke Cederhök en Gotenburgo. Distrito, kiu fariĝis populara en la tuta Svedio! Post la statuo de Cederhök kaj lia nomo sur tramo, baldaŭ estos tempo por plia omaĝo: La Strato de Sten-Åke Cederhök sur la eksa TV-domo en Örgryte.

Dum la ĉiutaga servutado liveri panon li revis pri la SCENEJO. Li havis 16 jarojn, kaj loĝis kune kun sia familio en Nordhemsgatan 67. Li ŝatis futbalajn maĉojn en Karlsro, sube de la Annedal-preĝejo. Li ankaŭ ŝatis komizinon en laktovendejo en Oliasvedalsgatan. Ŝi nomiĝis Lilly kaj fariĝis signorino Carlsson en 1937.

Sten-Åke diris, ke en la lernejo ĉiu sciis ke li estas frenezulo pri la teatro. Li aĉetis malmultekostajn klasikajn verkojn en antikvaŭvendejo en Södra Hamngatan, li rakontis en sia libro Teaterminnen. En la venonta numero ni rakontos pli pri Sten-Åke Cederhök.

Jen anekdoto de Cederhök el Ĝojkrio en la arbeta! (Jubel i busken)

En la butiko

– Kia konduto! Vi ne povas diri al la kliento: "Tion ni jam longe ne havas", vi devas respondi: "Ni finvendis ĉion"! Kion ni do jam longe ne havas?

– Sunbrilon!

Kontakto kun Samarkando

En oktobro 2017: Vorto pri Samarkando – la urbo, pri kiu oni ŝatas pensi, songi kaj paroli.



Ĝustatempe por la Internacia Letertago ni ricevis leteron de Anatoli Ionesov. Mi nur prenas parton de lia skribo:

Karaj amikoj, kolegoj, samideanoj,

Baldaŭ venos la signifoplena dato kaj festa okazaĵo por la urbo, pri kiu multegaj loĝantoj de la planedo ŝatas pensi, memori, revii kaj paroli. La 18-a de oktobro estas la Tago de Samarkando. La evento, kiu meritas refokusigi nian rigardon je alloga beleco, unika aromo kaj arkitektura dekoro de la urbo, iam nomita la "Perlo de l'Oriento". Bv skribi personan leteron al Samarkando aŭ verku saluton forme de poemo, kanto, desegnaĵo; aŭ komuniku viajn bondezirojn aŭ songojn por la estonteco de la urbo, kio ebligis al

Samarkando atingi la majestecon kaj por ĉiam eniri la historion!

Bonvolu sendi viajn reeĥojn, laŭeble, ĝis la 10-a de oktobro 2017 al nia retadreso: imps86@yahoo.com.

Amikajn bondezirojn el 2750-jara Samarkando, urbo de Monda Heredaĵo de UNESKO,

Anatoli Ionesov

Enciklopedia Projekto "Samarkandiana"
P.O. Box 76
UZ-140100 Samarkando Respubliko
Uzbekistano
imps86@yahoo.com

Mi respondis:

Bondeziroj al Samarkando de Esperanto-Societo de Gotenburgo, Svedio!
www.esperanto-gbg.org /Siv Burell
(siv.burell@gmail.com)

Kiam pluvegas en Nordo,
laŭ la klimata ordo,
ni pensas pri suna land',
la ora Samarkand',
for de ĉiutaga devo,
ni tien flugu en revo!

Gratulojn, Samarkando!

Post nelonge mi ricevis respondon. Ili demandis ĉu mi konas la svedan kanton *Se alvenos iam vi al Samarkando ???* Interese! Dankon Martin Strid pro Norda Kantaro.

Diversaĵoj

Höst-hajku om en ensam hund i en park.

Kvarglömd i parken
hur länge ska jag vänta
det börjar bli kallt

Karin Olofsdotter Hall, DN 10/11–17

Från Cecilia Wikströms FaceBook-sida

Orban förtalar Soros



Kommentarer

Roger Nilsson



Könsbyte

En man på en marknad i Kinna
Bytte grejer med Marks härskarinna
Och när allting var bytt
Och allt gammalt blitt nytt
Var det hon som var man, han var kvinna.

Aŭtuna hajku pri sola hundo en parko.

Lasita en park'
kiom pli mi atendos
fariĝos frosto



En Esperanton Siv Burell

Cecilia kaj Soros, tiu paro,
diskutis la fiaĵon de Orban
kiu sendis al hungararo
demandilon pri eksterlandaro.
Aparte li skribas pri Soros'
judo, akuzita de almoz'
de kvinmil dolaroj por helpi
al refuĝintoj trovi lokon
en Usono, sed fakte iame
Soros naskiĝis hungare
kaj judojn Orban ne ŝatas
aparte se ili por justeco batalas.

Siv Burell (traduko)



Seksoŝanĝo

Viro en foiro de Kinno
ŝanĝis aĵojn kun Mark-reĝino
kiam ĉio ŝanĝita
malnovaĵo novigita
ŝi estis viro kaj li ja virino

Mia fluganta kolorpaleta en la vintro!

Miaj gastoj estos malsataj! Mi havas ankaŭ danĝerajn gastojn. Tial la malgrandaj birdoj devas esti gardemaj. Nun **konkursu** pri la unua premio per miaj birdoj! Kombinu la literojn kun la ĝustaj ciferoj. /Ingegerd

- A. Granda paruo
Talgoxe
- B. Blua paruo
Blåmes
- C. Pirolo
Domherre
- D. Flava emberizo
Gulsparv
- E. Sito
Nötväcka
- F. Verda fringo
Grönfink
- G. Granda buntpego
Större hackspett
- H. Garolo
Nötskrika
- I. Merlo (amas pomojn)
Koltrast
- J. Pigo
Skata
- K. Ringokolombo
Ringduva
- L. Akcipitro
Duvhök
- M. Arbarstrigo
Kattuggla
- N. Kato
Katt
- O. Vulpo
Räv



1



2



3



4



5



6



7



8



9



10



12



11



13



14



15

Kanske ett tvåspråkigt julklappstips? Parallella dikter på svenska och esperanto



Kalejdoskop'

funderingar på svenska och
esperanto till akvareller

© Siv Burell
2013

Esperantotexten
granskad av Inga Johansson



Kalejdoskop' 2

Funderingar på svenska och esperanto till akvareller

Meditoj svede kaj esperante kun akvareloj.

© Siv Burell 2014

Inga Johansson kontrollis la esperantan tekston

Kalejdoskop' 2013 ISBN 978-91-7465-528-5 Pris 151:–

Kalejdoskop' 2 2014 ISBN 978-91-7465-65-3 Pris 139:–

Nomen förlag, Visby. Texter och akvareller: Siv Burell. Esperantotexten granskad av Inga Johansson.

Pengarna går till biblioteket i Stannum.

SPRÅKET ESPERANTO

Herr skolminister, du har glömt
att föreslå en språkreform!
Esperantovänner länge drömt
om lättnader i grammatikens norm.
Plågade elever vinner tid
och pengar säkert sparas
om i hela världen vid
språkproblemen klaras.

Språket esperanto, helt visst beundrar man
med tankar om en fredlig jord
där alla kan förstå varann
Men, var finns folket här i Nord
som gillar finna vänner
från främmande kulturer, säg!
Med Internet finns smidig väg
snart främlingar du känner
som talar fredens språk,
esperanto är för vänner.

LA LINGVO ESPERANTO

Ministro edukada, vi forgesis
proponi al lernej'
la lingvon kiu ĉesis
torturi al pere'
lernanton sen la emo
fiksiĝi je la temo
de gramatika premo
Pli facilan lingvon volas ni!

Min logas Esperanto
kaj ĝia mondrigard'
Sed kie ĝi troviĝas
la tuta hombrigad'
kun emo por legado
kaj sperto je skribado
kaj ofta babilado
en skajpo kaj en ver'?'
Pliiĝas nia sfer'
per esperantamikoj sur la ter'.

BLONDIE

BY DEAN YOUNG & JOHN MARSHALL



© 2012 King Features Syndicate Inc. World Rights Reserved.

Iom pri venontaj aktivaĵoj en Esperanto-Societo de Gotenburgo

Sabate 2 decembro 11–14 h

ESPERANTOSABATO

En la lokaloj de studorganizaĵo Vuxenskolan en lernejo Redbergsskolan ĉe placo Redbergsplatsen, Örngatan 6. Kursoj por komencantoj, progresantoj kaj konversaciemaj. Bonvenon!

Kunlabore kun  Studieförbundet
Vuxenskolan

Sabate 16 decembro 15h00

JULFESTO

ĉe Helfrid Karlsson, Gösta Andréas gata 1, Torslanda. Bonvenon!

Pli da informoj venos en nia retpaĝo:

www.esperanto-gbg.org

★ **Sendu al ni kontribuojn amase por la venonta numero de *Ora Ĵurnalo!*** ★

Vidu la kontaktinformojn en paĝo 2.

Enhavo:

Paĝo

2. Bonvenon al la nova Ora Ĵurnalo!
Göteborgs Esperantobiblioteks
Guldklubb "Ora Klubo".
3. La Esperantobiblioteko en Stannum.
4. Kelkaj fotoj de la "bibliotekejo" en
Stannum.
5. El la skatoloj en Stannum.
6. El nia fotokolekto.
7. Letero sub ŝranko estis mesaĝo de
malnova tempo.
La trezoro de Timboholm ekster
Skövde.
Legu jenajn librojn.
8. Aniaro – ĉiam aktuala.
9. Librosugesto.
Esperanto-Sumoo.
10. El Ora klubo -kunveno, 15 nov. en la
teknika ĉambro de la gimnazio de
Ingrid Segerstedt. Tempo por rakonti
memoraĵojn.
11. Ne perdu okazon influi la politikon!
12. Gotenburga etoso.
13. Kontakto kun Samarkando.
14. Diversaĵoj.
15. Mia fluganta kolorpaleta en la vintro!
16. Kanske ett tvåspråkigt julklappstips?
Parallella dikter på svenska och
esperanto.
17. Blondie.
18. Iom pri venontaj aktivaĵoj en
Esperanto-Societo de Gotenburgo.

